

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº6, Junio, 2009

Nia kara Leganto, jen rapide proksimiĝas la tradicia pikniko kaj UK en Pollando, kiun partoprenos (laŭ nia informo) 3 membroj de nia E-societo. Espereble, ili konigos nin pri la plejgrava evento de la monda E-vivo. Ni ankaŭ esperas pri la impresoj de niaj "ĝemeloj" en Varsovio. Kiu partoprenis la piknikon en 2008 memoras viglan junulinon Danjo (Darsi), kiu planis studi en Universitato de Iliinojo en Urbana-Ŝampano. Ŝi sukcese unuigis la lokan E-movadon. Legu pri tio en suba raporto de Filipino Bierfaranto. Hodiaŭ ni rompas nian tradicion aperigi ĉion nur en IL, pardonu nin kaj legu "krokodilan" informon, kiu aperis en monata bulteno de ATA (Amerika Tradukista Asocio).



Nun estas du Esperanto-klubo en Champaign, Iliinojo: Esperanto@UIUC (studentorganizo ĉe la Universitato de Iliinojo) kaj Ekoci (Esperanto-Klubo de Orient-Centra Iliinojo). Kune, la du kluboj organizis kvin-tagan Esperantan kurson, kiu okazis dum la unua semajno de Aprilo. Ĉirkaŭ dek personoj partoprenis. Ĉirkaŭ duono estis komencantoj. La cetero laboris kune por gvidi la kurson. Ni havis du celojn. Unue, plialtigi la Esperantan kapablon de la komencantoj sufiĉi, ke ili povos plene partopreni en la regulaj renkontiĝoj. Due, fari tiel, kiel la studentoj (kiu fakte ja partoprenos en tiuj renkontiĝoj) povos plene partopreni ĉe la Esperanto-USA jarkunveno en Sankta-Luiso. La kurso uzis la lernolibron Teach Yourself Esperanto. Tiu libro estas speciale por iu, kiu ne havas kurson – do eble ne estis la plej bona elekto por kurso, sed ni trovis, ke ĝi funkciis sufiĉe bone.

La libro provizas kelkajn specojn de praktikoj:

- tekstojn por legi;
- demandojn pri la tekstoj;
- frazojn por traduki en la anglan;

- frazojn por traduki el la angla;
- dialogojn.

Ni faris ilin laŭ kelkaj malsamaj metodoj. Iam ni legis la praktikon kune. Por la dialogoj, ni foje duopis. Pli ofte, kursano vice legis po unu frazon, kaj tradukis. Ni trovis, ke traduki el Esperanto funkciis sufiĉe bone, sed la "traduki en Esperanton" praktikoj bezonis tro da tempo (dum la aliaj kursanoj atendis). Tiujn ni proponis, ke la studentoj faru hejme. Malgraŭ tio, ni trovis, ke la libro sufiĉis por la bezonoj de nia grupo.

Multaj el la kursanoj havas lingvajn kaj lingvistikajn interesojn. De ili ni lernis multon pri la radikoj de Esperanto en eŭropaj lingvoj. Multaj gramatikaj aferoj, kiuj malsamas la anglan, similas aliajn eŭropajn lingvojn – kiujn konis kursano. Ni lernis kun intereso, ke la pola aŭ la ĉeĥa aŭ la itala faris tion aŭ tion ĉi simile. Dum kvin tagoj ni faris kvin ĉapitrojn el Teach Yourself Esperanto. Tiom, ni esperas, ja sufiĉos por atingi niajn celojn. Krome, ses el la kursanoj partoprenis la Esperanto-USA kongreson en Sankta Luiso.

Filipo

Esperanto Most Successful Deliberately Created Language

Esperanto was originally conceived as a universal second language to unite all of humanity. While it may have fallen short of its aspirations, it has been more successful than all other deliberately created tongues, says Amherst College Professor Ilan Stavans. The idea behind Esperanto's genesis was that it would be used to communicate with people who did not speak their native language. Speakers of Esperanto are passionate about the language because of its structural simplicity, its relatively fast learning curve, and its ability to allow speakers to comprehend the semantic roots of Latin and the Romance languages. "It is important to remember that its reception in the United States – lukewarm – hasn't been a uniform pattern," Stavans notes. "While I do know scores of American educators who speak about Esperanto with fervor, in higher education as a whole most people tend to ignore it altogether. Elsewhere, Esperanto is taught in numerous places as different as Vietnam and Brazil." Stavans attributes the generally low interest in the U.S. to the widespread use of English. He believes that Esperanto has endured mainly because of ideological considerations and not because of its practicality. "The dream is driven by the utopianism of transnationalism – the very thing that is also its Achilles' heel."

Stavans, Ilan "Doktoro Esperanto's Dream" Chronicle of Higher Education, DC, 22/5/09

Tradicia pikniko

Bedaŭrinde ni malsukcesis organizi la ĉi jaran piknikon junie, sed ne perdis la esperon – la 26an de Julio ĉiuj dezirantoj estas invitataj partopreni nian tradician aranĝon en Shiller Forest preserve (arbara rezervejo de Ŝilera Parko) ¼ m. okcidenten de la stratkrucio inter Camberland kaj Irving Park. Vidu la mapon. Proponata tempo: de tagmezo – ĝis la 4a pt. Prenu manĝaĵon kaj trinkaĵon laŭ via plaĉo. Rostigilo funkcios. 1-2 aŭtoj estos pretaj veturigi gesamideanojn je 11.45 de la haltejo Camberland (blua linio).



Por ĉi servo telefonu 773-344-2276 aŭ sendu ret-mesaĝon al Viktoro araneosp@yahoo.co.uk. Ĝis la!

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

- 28an de Julio – Historion de Pompeo klarigos Karlo Offutt
- 25an de Aŭgusto – UK en Bjalistoko
- 22an de Septembro – prelegonto estas serĉata
- 27an de Oktobro – Araneo rakontos pri Ukrainio
- 24an de Novembro – elekto de nova gvidantaro
- 13an de decembro – Zamenhofa tago en Evanstono

